



NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 284

Dépôt à la Bibliothèque Nationale, au fonds normand de la Médiathèque de Caen, aux Archives du Calvados et à la Bibliothèque de Cherbourg.

Septembro 2022

Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48

ivnicolas@sfr.fr

Enpaĝigas : Michèle Langeois

Korektas Dominik Cornice

Abono-kotizo : 10 €. « Espéranto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasistino : Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier. 76600 Le Havre



Muzeo : Fundação de Serralves-Porto-
A arte dos Cogumelos
(L'art des champignons) (à retrouver sur you tube)

ENHAVO

- P. 1 : Enhavo, éditio
- P. 2 et 3 : Mia dua hejmo, Armel Amiot, banĝo esperanto; muzeo en Islando
- P. 4 : Fungoj, unua parto
- P. 5 : Lanti, forpasoj
- P. 6 et 7 : Dosiero Biciklado (3)
- P. 8 : Staĝo en Grésillon, libro
- P. 9 : Tri poemoj

P. 10, 11 et 12 :

Turisma tago en Dives-sur-Mer

Alors, tous à Dives-sur-Mer, le 15 octobre !

La Manche est à la pointe ! Le chanteur Armel Amiot, de Cherbourg, remplit les salles avec son spectacle original et a été sur scène par internet à l'occasion du Congrès Universel d'Espéranto de Montréal. Des espérantistes (Christian, Simon, Rémi, Véronique et Patrick, peut-être d'autres) ont beaucoup apprécié le niveau professionnel et le dynamisme de l'artiste. Rémi, de Carentan, va nous mettre en appétit en écrivant sur les champignons le long de plusieurs numéros de notre bulletin. Marcel, plus connu comme Père Marc de l'Abbaye de Bricquebec, a lancé son prochain livre sur Lanti grâce à un article avec photo paru dans la presse locale. Nous attendons avec impatience la sortie de ce livre sur un des personnages majeurs de l'histoire de l'espéranto.

Mais attention, ça bouge également dans d'autres départements ! Le Calvados, d'où sont partis Véronique et Bertrand pour un voyage à vélo jusqu'au Danemark avec de nombreuses rencontres espérantistes et un rapport français-espéranto quotidien sur leur site... ce qui a donné l'envie à Cora de nous instruire sur la pratique cycliste en Hollande, son pays de naissance. Anne-Marie, de Flers (Orne), a fait de belles rencontres au Château de Grésillon qui dispense, depuis de nombreuses années, des cours d'espéranto de qualité souvent animés par des espérantistes étrangers.

D'autres adhérents de notre association régionale, Henri, Gérard, Michèle agrémentent ce nouveau bulletin par des photos et des poésies.

Une belle récolte, donc. Mais ce n'est pas fini ! Ne ratez pas notre rendez-vous touristique annuel, avec un programme culturel grand comme ça !



MIA DUA HEJMO

Iuj luprenas aŭ aĉetas duan loĝejon por pli bone ĝui libertempon kaj liberiĝi de la ĉiutagaj taskoj. La destino trudis al mi alian «elekton» kiu konsistas el vizito plurtaga monate al la universitata hospitalo de Caen (CHU) por kuracado kontraŭ kancero kun la ekzotika nomo «Lymphôme». Ni kune vizitu mian loĝejon en moderna kvaretaĝa domo, apud la enirejo de la hospitalo. Ties kvara etaĝo prizorgas la sangajn malsanojn. Ĉiu malsanulo loĝas en duĉambra apartamento. La unua por la laŭdezire faldebla lito por pli komforta ripozo kaj la dua por la duŝo kaj la necesejo. Tiun ĉi mi nepre devas aliri, tage kaj nokte, ĉiun duonhoron, por urĝa urina bezono. Necesas 6 paŝoj por atingi ĝin sen riski stumblon pro tre ŝercema tubo kiu ligas mian maldekstran brakon al pluraj boteloj da likvaj medikamentoj.

Dum mia unua restado, tra fenestro de la loĝejo n° 16, mi povis vidi, sur la herbejo de la apuda hospitala vartejo, dikan kaj viglan kuniklon kiu senmanke frumatene kaj sunsubire trankvile manĝetas. En la n° 10a, mi nun vidas kontraŭan muron kun farbo vulpokolora grandparte truitan per du vastaj pli-malpli ovalaj fenestroj. De sur la tre proksima tegmento, mi ofte aŭdas la alvenon de helikopteroj kaj ĉiu-foje kompatas la homojn kies sano subite postulis urĝan transporton al la regiona hospitalo.

Mia restado ĝenerale konsistas el 3 ĝis 5 tagoj por kemia terapio tre laciga sed ne doloriga. La personaro estas tre atentema kaj profesia kaj videble laboras en bona etoso. Ili havas je sia dispono modernan materialon. « Jen konservenda, eĉ ampleksenda, elspezo de nia publika mono ! » ni senĉese krii al tro surdaj ministroj...

Tiaj bonaj kondiĉoj tre certe helpas min batali, eĉ venki tiun fian malsanon, sed ankaŭ tre gravas la amikaj mesaĝoj de la normandaj kaj eksterlandaj samideanoj kies movada nomo enhavas tre signifoplenan radikon : « esper - ».

i.Greko. En CHU, la 11an de majo.



Armél Amiot apporte un souffle nouveau à notre mouvement régional en présentant son spectacle « **Banjo Esperanto** » dans des lieux et pour des publics très divers.

En voici la démonstration ! Le 26 juillet, spectacle-conférence gratuit dans l'Espace Culturel Leclerc à Tourlaville, intervention par internet durant le congrès mondial d'espéranto (UEA) à

Montréal, le 2 octobre en trio à la galerie « La Bouée » de Cherbourg et le 16 décembre aux Escales MKS, halle 901, à Saint-Pierre Eglise. Il ne tient qu'à nous tous pour que d'autres concerts aient lieu dans d'autres villes et villages de Normandie. Succès assuré et spectacle de qualité, comme l'attestent les retours de Simon et Patrick. Pour contacter Armél : 06 68 18 95 32

Armél ankaŭ koncertis en « Le repas »

En la vilaĝeto « Le repas », inter Granville kaj Villedieu, situas kafejo « La Rufa Luno » kie oni povas bone manĝi, trinki kaj aŭskulti muzikon. Tiun vesperon en intima etoso Armél Amiot koncertis. Sidante ĉe piano, li unue interpretis francajn kantojn de konataj artistoj kiel William Sheller, Véronique Samson kaj pluraj aliaj. Li ĝenerale estas akompanata de muzikistoj, sed tiun fojon li talente kantis kaj muzikis, sola sur la eta scenejo. Dum la dua spektakla parto nomita « Banjo-Esperanto », Armél rakontis, ke dum multaj vojaĝoj li havis

kontaktojn kun aliaj lingvoj kaj, cetere, ofte kantas en iu kreola lingvo. Dum la unua pro pandemia izoligo en 2020, li havis la « strangan » ideon lerni esperanton kiun li tuj muzikaranĝis kaj finfine starigis spektaklon pri kaj en Esperanto. Liaj tekstoj estas facile kompreneblaj kun vigla kaj agrabla muziko. Ni ĝuis tre belan aranĝon je profesia nivelo. Nepre ne mistrafu la spektaklojn de Armél kaj invitu lin en via plej ŝatata kultura kafejo !

Patrick Etienne (50)

Banĝo Esperanto: komponi kaj kanti por lerni Esperanton

La dimanĉon 8-an de Majo organizis la asocio de la iamaj lernantoj de la kolegio Saint-Paul, en Cherbourg, esperantan kunvenon kun la kantisto kaj muzikisto **Armel Amiot**. Tiu okazis en la bela kaj nekonata kapelo de la kolegio, kiu troviĝas en la centro de la urbo, sed ne estas tre videbla de la strato. La kapelo estas malofita (kaj unika en Cherbourg) ekzemplo de betona konstruaĵo de stilo « Art nouveau » (Nova arto) sed suferas difektojn kaŭze de la tempopaso. La kunveno estis por la asocio okazo kolekti monon por la renovigo kaj, por la ĉeestantoj, ekkoni tiun kapelon, okaze de Esperanto aranĝo.



Armel Amiot tre bone rakontis, kiel li malkovris la lingvon de Zamenhof. Dum sia kariero de muzikisto, li jam multe vojaĝis kaj interesiĝis pri lingvoj kaj kulturaj interŝanĝoj. Interalie, li ŝatis kanti kreolajn kantojn de norda Ameriko. Dum la tutmonda kvaranteno de 2020, kiam la mondo haltis, li ne povis pluigi siajn projektojn kaj havis tempon por malkovri Esperanton kaj ĝian funkciadon. Li rakontis al la ĉeestantoj, ke li tuj enamiĝis al tiu simpla sed bela kaj esprimplena

lingvo. Li provis memlernante komponi en Esperanto, kaj pliboniĝis, danke al konsiloj de esperantistoj, kiuj aŭdis lin interrete.

Interesa parto de la kunveno estis la klarigoj de Armel Amiot pri sia maniero komponi muzikon per Esperanto. Laŭ li, tiu lingvo enhavas ambaŭ belajn kaj malagrablajn sonojn por francaj oreloj. La multaj vortoj finiĝantaj per « -a » aŭ « -o » sonas tiel sunaj latinaj lingvoj, kiel la itala aŭ la hispana. La akcentado, kiu ne vere ekzistas en la franca, ne estas tre facile manipuli, sed tre bone helpas emfazi la ritmon de la kanto. Kun la « -aŭ », la « -oj » kaj la « ĝ », la komponisto devas singardemi. Sed la « ĥ » kaj la « -ojn » estas laŭ A. Amiot strangaj sonoj, kiujn li devas tute preventi al la fino de versoj.

Post tiu unua parto de klarigoj, Armel Amiot kaj sia muzikgrupo animis la kapelon per ludado kaj kantado en Esperanto. La du aliaj instrumentoj, drumo kaj kontrabaso, tre bone.

Simon Roussigné (14)



libro pri esperanto

Belle rencontre à Hali (Islande) Juillet 2022.

Au hasard de notre voyage, nous avons découvert à Hali le musée consacré à l' écrivain islandais (1888-1974)-**Pórbergur Pórðarson**

Le mur est constitué d' une quarantaine de tranches de livres de couleur vermillon.

Je cite le guide du routard :

" Humaniste, **propagateur de l'espéranto** (langue universelle) et antifasciste, Pórbergur Pórðarson fut condamné à 200 Isk d' amende par la cour suprême pour avoir diffamé un chef d' État étranger... Adolf Hitler"

Michèle Langeois (14)

Quand **Monato** sous la plume de Renée Triolle parle des **BORÉALES** et quand la page Facebook des Boréales parle de Renée Triolle et de l' Espéranto.



Festival Les Boréales

15 h ·

Tout arrive! Premier article consacré aux Boréales en espéranto dans Monato !

Merci à Renée Triolle (La Ciotat), déléguée officielle auprès de l'UNESCO pour l'UEA (association universelle d'espéranto).

Fungoj (unua parto)

Antaŭ mia emeritiĝo, mi laboris kiel arbaristo (ĉe la Nacia Arbarista Oficejo (Office National des Forêts)). Dum mia kariero, mi ĉiam interesiĝis pri fungoj pro profesia kialo (fungoj povas esti signoj de malsano) aŭ pro simpla emo gustumi tiujn kiuj estas manĝeblaj.

Poste, dum la lasta parto de mia kariero, mi partoprenis la fakan reton pri fungoj ene de ONF.

Dum tiuj jaroj, mi sekvis unujaran kurson pri fungoj ĉe la universitato de Lille por akiri diplomon kiu konfirmis mian kapablon studi kaj determini specimenojn dum surlokaĵaj enketoj (precipe ene de naturaj rezervejoj). Nun mi dezirus komuniki pri mia emo (pasio verdira) al ĉiuj esperantistoj kiuj interesiĝas pri naturo.

La temo kiun mi aŭdacas pritrakti estas ege interesa, sed ne eblas montri la vastecon de la temo per kelkaj frazoj. Mi do proponas, sen esti tro specifa, skribi plurajn artikolojn mezlongajn laŭ pluraj temoj.


1 - kio estas fungo ?

2 - amikoj aŭ malamikoj – (interagoj inter fungoj kaj arboj aŭ aliaj medioj)

3- fungoj kaj homoj (uzoj de fungoj en pluraj kampoj)

4- manĝi aŭ ne manĝi (bongustaj fungoj kaj mortigaj fungoj)

5- klasifikado, kie trovi pluan informon



1 Kio estas fungo ?

Al la demando « Kio estas fungo ? », preskaŭ ĉiuj homoj (krom fakuloj) ŝablone respondas per priskribo de io pli-malpli simila al la bildo ĉi supra. Fakte, tio kion oni vidas, kaj kelkfoje plukas, estas la "frukto" de io malvidebla pro sia malgrandeco kiu konsistas el hifoj (hyphes) (longaj kaj tre mallarĝaj tuboj) plektitaj en ia reto nomita micelio (mycelium). Unusola vegetaĵo povas formi tre vastan reton de pluraj miloj da kvadrataj metroj. El tiu « individuo », kiam veteraj kondiĉoj estas favoraj, povas

formiĝi aparato kies funkcio estas la produktado de "sporoj"

Sporoj estas iasence, semoj de fungoj.

Restas io tre grava por scii :

Kia viva estaĵo estas fungo ?

Ĉu planto ? Ne : fungoj ne havas kloroplastojn, do ne povas fabrikati sukerojn el lumo kaj aero

Ĉu besto ? Ne : fungoj ne povas digesti siajn nutraĵojn ene de sia korpo (hifoj), ili devas digesti ilin ekstere (per enzimoj kaj aliaj substancoj) kaj poste ensorbi la rezulton.

Fakte, fungoj apartenas al sia propra viva regno : la fungoj.

Kie vivas la hifoj ?

Fungoj vivas tie kie ili povas nutri sin.

Laŭ ilia vivmaniero, oni povas distingi tri klasojn :

- Saprotrofaj : fungoj kiuj nutras sin per mortaj estaĵoj (folioj, branĉoj, morta ligno)

- Parazitaj : fungoj kiuj nutras sin per vivaj estaĵoj (arboj, plantoj, bestoj, homoj !). Ili sorbas la sukron de la kreskaĵo aŭ detruas partojn de la ĉelaroj. Ĝenerale, la viktimoj (gastigantoj) post malpli fortiĝado, mortas. Tiam, la fungo povas fariĝi saprotrofo kaj fini la laboron !

- Simbiozaj : ili estas la bonuloj de la teamo. Hifoj volviĝas ĉirkaŭ la radiketoj de arboj por formi mikorizojn. Tiuloke, la fungo povas sorbi la sukeran sukron de la arbo sed la malgrandeco de la hifoj ebligas la kaptadon de akvo kaj mineraloj multe pli efike ol la radikoj mem de la arbo. La gastiganto (arbo) do povas danki al la fungo por provizi al si la nutraĵojn (akvo + mineraloj) kiujn ĝi bezonas.

En la venonta bulteno : « Fungoj : Ĉu amikoj aŭ malamikoj ? »

Rémi Troisgros (50)



Pastro Mark el la Abatejo de Bricquebec jam de longe interesiĝas pri **Eugène Adam** kiu naskiĝis en apuda vilaĝo, Nérour. Unuavide, oni volonte opinius, ke nenio alia ol tiu geografia proksimeco povus ligi ilin. La unua donacis sian vivon al sia kredo dum la dua, ĝis osta revoluciulo, forbalais ĉiajn dogmojn, eĉ elektis kiel kromnomon « **Lanti** » el la franca prefikso « anti- » (kun radikala signifo « kontraŭ »). Sed Mark kaj Lanti havas komunan emon al intelekta libereco sur kies padoj ili povas iel maniere renkontiĝi. Mark jam prelegis pri Lanti en Hérouville en 2011 kaj okaze de SAT kongreso (Sennacieca Asocio Tutmonda)

en Dinan. Ni legos kun granda intereso lian aperontan libron !

Loisirs - Culture

LITTÉRATURE. Le père Marc va évoquer Eugène Adam, alias Lanti, né à Néhou

Un livre sur un espérantiste

DANS le bureau de la modeste maison qu'il occupe un peu à l'écart de l'abbaye de Bricquebec, le père Marc est à la tâche. Nous connaissons le moine cistercien créateur et responsable de la fameuse charcuterie de la Trappe. Nous le savons grand lecteur, de textes politiques, philosophiques et aussi des romans de Jules Barbey d'Aurevilly. Aujourd'hui, nous le découvrons auteur. « Je suis en train d'écrire un livre sur Lanti, il est bien avancé, mais si je vous fais déjà venir pour en parler, c'est un peu pour m'obliger à finir rapidement », s'amuse le religieux, l'œil malicieux.



Le père Marc a voulu rendre hommage à celui qu'il estime être l'un des grands penseurs de la Manche, Eugène Lanti, en lui consacrant un ouvrage à paraître cet été.

Anarchiste et espérantiste

Lanti (1), Eugène Adam de son vrai nom, est né à Néhou un 19 juillet 1879 et mort loin de son Cotentin natal, au Mexique, le 17 janvier 1947. Ouvrier menuisier devenu enseignant dans un lycée parisien grâce à des cours du soir, ce grand voyageur (Europe, Japon, Australie, Amérique du Sud) fut un militant libertaire puis communiste, animateur du mouvement espérantiste et « anationaliste ». « Son idéal était qu'il n'y ait qu'un gouvernement, qu'une monnaie et qu'une seule langue dans le monde. Il était contre toute so-

lution intermédiaire », explique le père Marc.

Comment a-t-il lui-même eu vent de ce personnage au parcours étonnant ? « C'est arrivé par un ami espérantiste, à Caen, en 2005. Il me dit : Lanti est né dans ton coin. J'ai cherché à en savoir plus, et j'ai lu le livre d'E. Borsboom, *La vie de Lanti*. Cela m'a passionné », répond le religieux devenu depuis un espérantiste averti.

Son ouvrage comprendra la biographie d'Eugène Lanti et présentera les œuvres principales de ce dernier. « À part ses carnets de guerre, il écrivait tout en espéranto, mais que les

lecteurs se rassurent, mon livre est rédigé en français », observe-t-il.

Pour le centenaire de son voyage en URSS

« On dit que cet homme était un libre penseur. Pour moi, c'était plutôt un penseur libre, qui a perdu la foi à l'âge de 17 ans, mais qui était travaillé par la religion en permanence. Il prenait tout au sérieux. Il avait à sa manière quelque chose d'un moine », commente l'auteur. « On n'est pas obligé d'être d'accord avec lui, mais sa clarté d'expression force

l'attention et le respect. »

Le père Marc a d'ores et déjà trouvé un éditeur. « Il faudrait que mon livre sorte pour août car cela correspond au centenaire du voyage de Lanti en Union soviétique », précise-t-il. Aux dernières nouvelles, il ne lui restait quasiment plus que le titre à peaufiner.

Corinne GALLIER

(1) Lanti est le surnom donné à Eugène Adam en raison de son goût pour les « anti », anticléricaux, antimilitaristes... C'est devenu son pseudonyme.



29/11/2011

Hérouville-Espéranto.

Après le conférence, le Père Marc se restaure, ici en la Cie de son vieux copain, Jean Magerel.



Forpasoj



Jean kaj Madeleine en 2015, dum kantado fine de la kurso en Hérouville.

Madeleine Guionie. Ŝi forpasis la 30an de julio en la hospitalo de Caen, du jarojn post sia kunulo Jean Magerel. Ŝi estis instruistino kaj venis de Montpont (Dordonjo) kies belan akcenton ŝi konservis. Madeleine aliĝis al la klubo de Hérouville komence de la 90 jaroj kaj dum multaj jaroj kontribuis al ties vivo. Ŝi partoprenis en 1992 la 11 homan kaj unuan vojaĝon al Tiĥvino (Rusio), efike helpis en la akcepto de SAT-Amikara kongreso en 1993 en Hérouville, kaj uzis esperanton okaze de pluraj enlandaj kaj eksterlandaj aranĝoj.



Pierre et Claudine en 2014

Adiaŭ, amikino Claudine !

Kun malĝojo, ni anoncas la forpason de amikino Claudine Pottier la 16an de februaro 2022. Ŝi estis fervora samideano kiu sindoneme agis kun Pierre al diskonigo de Internacia Lingvo en nia regiono. Precipe en departemento 76, ili ambaŭ aktivegis ekde oktobro 1959 « sub bela verda stelo ». Esperanto, efektive, ludis specialan rolon : « edzperanto » : Claudine konatiĝis kun Petro pro esperanta ekzameno kaj lia fratino edziniĝis kun jugoslava samideano. Ni sincere kompatas kun familio Pottier.

Sylvie Caron (76)

DOSIERO BIKIKLADO (3)

Karaj amikoj,
Ni foriris Normandion fine de majo kaj jam trairis tri landojn (Francion, Belgion, Nederlandon). Ni nun estas en Germanio. Post kelkaj tagoj ni atingos Danion, kies marbordon ni laŭiros okcidente ĝis Grenen, la plej..



Normanda Bulteno

POŝTKARTO

Karaj amikoj,

Ni foriris Normandion fine de majo kaj jam trairis tri landojn (Francion, Belgion, Nederlandon). Ni nun estas en Germanio. Post kelkaj tagoj ni atingos Danion, kies marbordon ni laŭiros okcidente ĝis Grenen, la plej norda punkto de la lando, kie du maroj Skagerrak kaj Kattegat renkontiĝas.

Ni poste reiros hejmen laŭ la orienta flanko de la lando. Ni iom paŭzos en Odense kaj dum kvar tagoj en Kopenhago. Poste, reirante hejmen, ni denove traĵiros Germanion kaj Belgion. Kaj... meze de septembro, post centtaga kaj sesmila biciklado, ni revidos Normandion...

Ni biciklas averaĝe 60 kilometrojn tage. La vetero ĝis nun estis sufiĉe favora. Sed, kompreneble, dum tiom longa vojaĝo, certe ne estos ĉiam tiel.

De tempo al tempo ni luas dormĉambron, tamen plejofte ni tendumas kaj kelkfoje tranoktas ĉe bonkoraj anoj de la reto Warmshowers.org per kiu biciklantoj gastigas biciklantojn.

Ankaŭ, danke al **Pasporta Servo**, ni amikiĝis kun kelkaj esperantistoj kiuj bonvenigas nin kaj... helpas nin plibonigi nian parolkapablon : nia vojaĝo ankaŭ trairas Esperantujon.


Ni fotis kelkajn ZEOjn survoje. Ne nur en Hérouville, oni omaĝas Esperanton kaj ĝian kreinton. Kelkaj estas konataj kiel la

statuo de L.L. Zamenhof en Bulonjo-ĉe-Mar sed ankaŭ estas aliaj pri kiuj vi verŝajne neniam aŭdis. Ekzemple, ĉu vi jam vidis tiun ventoturbino kun granda glumarko « Esperanto » en la malgranda nederlanda vilaĝo Idsegahuizum ? Ni vizitis la verdan stelon, la esperanto-klubon de Antverpeno kaj ni vizitis la klubon de Hamburgo kie ni « prelegetos » pri nia vojaĝo. Timega afero... Mi ne estas spertulo kaj neniam parolis al grupo de homoj, krom en nia klubo... Por naĝlarni, vi devas salti en la akvon... metio lacigas, metio vivigas.

Ĉiutage, ni malkovras mirindajn pejzaĝojn, la normandajn klifojn, la belgajn kaj nederlandajn kanalojn, Vadmaron. Ne tiom gravas la celo de la taga etapo, nur la emocioj kiujn vi sentas dum vi biciklas. Tiu senĉesa sama pedalmovado liberigas vian menson kaj atentigas vin al multaj grandaj kaj malgrandaj mirindaĵoj.

Senmove, vi povas bicikli kun ni danke al nia blogo: <https://cutt.ly/TraEspertantujo> ! Ĝis...


Veronik' kaj Bertrand Verstraete
(14)



NEDERLANDO, BIKIKLA LANDO

Ĉu vi konas la sistemon uzatan en Nederlando por faciligi bicikloturisman?
Ĉi tiu sistemo konsistas el tri elementoj:

- 1) la TOPOj (to o po)
- 2) la ligpunktoj
- 3) ripozpunktoj





Tiu sistemo estis tiel sukcesa ke ĝi nun estas ankaŭ uzita por la reto de marŝadovoj kaj de akvovoj.

1) La TOPOj

En la nederlanda: Toeristisch Overstap Punt (Turisma translokiga punkto)

Estas vojkruĉigo de turismaj itineroj.

La TOP estas loko speciale desegnita por servi kiel elirpunkto (= point de départ) de turisma cirkvito per biciklo, piede aŭ per boato.

Tiu loko havas sufiĉe da aŭtoparkadoj kaj ankaŭ publika transporto ofte haltas ĉe tiu loko.

La TOPOj estas indikitaj per brunaj paneloj laŭ la alirvojoj (foto 1) kaj estas markitaj, depende de la regiono, per identa objekto.

Ekzemple, en la nordo de la lando estas granda konuso de ŝtonoj, kaj en la okcidenta parto de la lando estas gigantaj herbfolioj el ŝtalo (foto 2).

Ĉiu TOPO havas mapon de la regiono kun la reto de padoj. Oni ankaŭ trovas ĉi tie informojn pri interesaj lokoj por vidi en la ĉirkaŭaĵo.

Depende de la grandeco de la TOPO, oni povas ankaŭ trovi tie, ekzemple, kafejon aŭ restoracion, turisman oficejon, muzeon, kulturen centron aŭ luofirmaon de bicikloj aŭ boatoj.

2) La ligpunktoj (knooppuntensysteem = système de noeuds ou points de connexion)

Ĉi tio estas speciala vojmapo por biciklantoj. Ĝi estas reto de punktoj. Ĉiu punkto havas nombron kaj estas ligita al unu aŭ pluraj aliaj punktoj. La distanco inter du punktoj estas indikita (foto).

Ĉi tiu sistemo permesas al la biciklanto formi cirkviton laŭ la dezirata distanco.

Survoje, oni devas simple sekvi la malgrandajn signojn kiuj estas apud la biciklovojo (foto 3)

3) La ripozpunktoj (rustpunten = points de repos)

En la tuta lando estas ĉirkaŭ sescent ripozlokoj, plejparte privataj posedaĵoj.

Estas tre diversaj iniciatoj de loĝantoj, kiuj invitas turistojn en siajn hejmojn.

Ili aranĝas lokojn kie vi povas aĉeti varman kafon, kukon, ktp. Estas tabloj kaj seĝoj por ripozi. Kelkfoje oni povas reŝargi tie la baterion de elektra biciklo. Multaj farmistoj partoprenas kaj ofte permesas al biciklantoj viziti la bienon.

Ĉi tiuj ripozejoj malfermiĝas nur dum la somero (foto 4)

La deveno de la sistemo

La sistemo estis kreita danke al la mina inĝeniero Hugo Bollen.

Post la fermo de la karbominejoj en la provinco Limburgo (en la suda parto de la lando), li volis revivigi tiun ekonomie detruitan regionon.

La sistemo de ligpunktoj indikitaj per nombroj estis uzita subtere por trovi sian vojon tra la labirinto de minaj koridoroj. Sinjoro Bollen havis bonan ideon, ĉar la turisma sektoro de la regiono fartas bone, precipe ekde la apero de la elektra

biciklo.

Cora Dion (14)



MI PARTOPRENIS PROGRAMEROJN DE LA « SOMERA MARATONA KURSO » EN GRÉSILLON.

De Katalunujo al Pollando, de Grekujo al Britujo, Belgujo, Francujo, Hispanujo, Italujo, Nederlando, 24 homoj renduevis la lundon 11an de julio en Kastelo Grésillon kie aperitivo bonvenigis ilin. Ili venis por partopreni diversajn aranĝojn.

Mi elektis la meznivelan kurson kiun instruis Aleks, kataluno loĝanta en Roterdamo kun sia esperantista familio. Li uzis la metodon BEK de Dennis Keefe por 8 homoj : unu francino vivanta en Grekujo, unu bretono de Saint-Brieuc, tri junuloj de Hispanujo, Nederlando, Katalunujo, du aliaj homoj de Italujo, Katalunujo kaj mi.

La aliaj homoj partoprenis kursojn de Andrea de Lyon (por komencantoj) kaj Pawel de Varsovio (supera kurso).

Ni matenmanĝis je 8a kaj sekvis kurson de la 9a ĝis la tagmanĝo. Dua kurso de la 16a ĝis 18h30. Post

la vespermanĝo okazis prelegoj pri historio de Esperanto (Pawel Fisher Kotowski), pejzaĝoj de Grekio (Hélène Vernerey), Bahaismo (Bernhard Westerhoff), Ĉampano (Paul Quévy), Unesko kaj Esperanto (François Lo Jacomo), Logika ideograma skribsistemo (Bert Schumann).

Okazis ekskurso ĝis la famaj kasteloj en Langeais kaj en Azay-le-Rideau kaj ni ĝuis freŝan aeron en troglodita fungejo.

Pluraj homoj trapasis ekzamenojn kiujn organizis ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruantoj) laŭ la lingva Kadro Eŭropa de Referenco (KER) por la niveloj A1, A2, B1, B2, C1, C2.

Denove, mi ĝuis belan kaj instruplenan restadon en la Kastelo Gresillon, tre fama en Esperantujo...kaj tre proksima de Normandujo. Ne hezitu partopreni la venontajn aranĝojn kiujn vi legos ĉe «gresillon.org».

Anne-Marie Leprévost (61)

En français ou en espéranto, à lire absolument !

Nombreuses ont été les victimes espérantistes du nazisme et du stalinisme. Une grande partie de « **La danĝera lingvo** » (1973) de Ulrich Lins est consacrée à ces années terribles pour les hommes et pour la langue internationale. Le livre en espéranto, a été réédité et complété à plusieurs reprises et traduit dans plusieurs langues, Depuis le printemps 2022, on peut le lire également en français grâce aux Editions L'Harmattan sous le titre « **L'Espéranto, langue dangereuse** », à partir de la version espéranto de 2018, la plus récente. L'ouvrage de 474 pages et contenant de nombreux documents est indispensable à qui s'intéresse à l'histoire souvent mouvement de notre langue.


Pri tiuj temoj multaj libroj estas legeblaj en esperanto, inter la plej novaj : de Mikaelo Bronŝtejn la bela kaj tre sukcesa romano « Mi stelojn jungis al revado » kaj « Sortoj frakasitaj ». Pri naziismo « La Zamenhof-Strato » de Roman Dobrzynski (intervjuo de la nepo de Zamenhof, kiu sukcesis postvivi la persekuton de la judoj en Pollando).

vidéoconférence du 26 juillet : <https://www.youtube.com/watch?v=Id5INEIOhxl>

Mise à jour des adhésions 2022 au 15 août 2022

B- Badmington Janine (76), Beliava Olga (Rusio), Bessin Véronique (50), Besneville Annick (50), Bodin Michelle (50), Bonnet Sylvie (27), **C-** Caron Sylvie (76), Charles Véronique (14), Cornice Dominique (14), Cottin Brigitte (14), **D-** Danvy Jean-Pierre (50), Defrance Josiane (76), Dion Cora (14), Dufeu Patrice (76), Dufresne Bernard (76), Duval Evelyne (76), **E-F-** Echappe Lucette (44), Etienne Patrick (50), Ferrand Claude (14), Fortin Francine (14), **G-H-** Girard Véronique (14), Glémot Françoise (50), Gueroult Ginette (76), Herpin Lucienne (50), Hubert Madeleine (14), **J-L-** James Jean-Pierre (50), Jenny Dominique (27), Jourdain Marie-Line (97), Langeois Michèle (14), Lardeur Maurice (14), Lebrun Rémy (27), Lecarrie Auguste (50), Lemarchand Pierre (76), Lemeltier Marcel, Leprévost Anne-Marie (61), Lévesque Christian (50), Loisel Denise (83), Longuet Jeanine (14), **M-N-** Madella Alessandra (Italio), Marie Françoise (14), Maurau Barthélémy (27), Mérel Elisabeth (50), Mulot Annick (50), Nicolas Yves (14), **O-P-** Oberrauh Luigia (Italio) Paris Yolande (27), Piette Marie-Anne (14), **R-S-T-V-Z-** Robiollé Pierre (50), Rousseau Henri (14), Rousseau Jeanine (60), Thierry Marie (75), Sauvage Jean-Pierre (14), Sénécal Gigi kaj Gérard (14), Verstraete Bertrand (14), Zilliox Philippe (27)

TRI POEMOJ



FALO DE KORPOJ (La chute des corps)

Mi fortiris la ŝelon de bolitaj terpomoj
En mia kuirejo, kiam unu el la legomoj,
Verdire malgrandega, fifalis ĉe la plankon.
Tre malprobabla fakto, ĝi sekvis tian vojon
Ke ĉiuj miaj streboj ĝin retrovi ne povis.
Ĝia kulpka kaŝejo mistero por mi restis.

Kvarkrure, kvinminute, senrezulte mi
serĉis.

Ne kutimaj min vidi, meblaj piedoj miris.
Sed trovi la fuĝinton mi tute ne sukcesis.
Dank'al kiu trueto, kiu muranguleto,
la ruza tuberkulo restis ekster rekaptito ?
Eĉ al la balailo ĝi kapablis rezisti,
Por sub ŝuplando mia, fine kapitulaci.

La unua mi diras pri tiaj kazoj oftaj,
Ke objektojn instigas, spiritoj malbonvolaj.
Solaj ili ne povus esti sufiĉe lertaj
Por falante, tuj iri, en la nura loketo
De mia kahelaro kie troviĝas
punkto

En kiu ili povos esti en sekureco.

Henri Rousseau (14),



Moissey Bronshteyn

En iu ĉarma temp', ne tre malnova,
mi ĝojis umi ĉe l' frandaĵ' litova,
ĉe la bongusta barĉo, cepelinoj,
sen pensi, ke ekzistas ja landlimoj,
ke ĉion povas ŝanĝi stulto, blago,
de la freneza ul' freneza ago.

Do mi bonŝancis vivi en proksimo,
sed ve - fermitas tiu ĉi landlimo -
la voj' al la frandaĵoj. Eĉ pli gravas,
ke sen amikoj miaj vivo mavas,
sen ĉiuj, kiujn ŝatas mi sincere,
vivantaj trans la kruda lim' surtere.

Mi estas olda, pensas mi naive,
landlimojn ĉiujn hatas mi dumvive,
sed gravas pli ke, pro l' militaj moroj,
landlimoj venas nun al niaj koroj.
La rond' amika krevis en kvereloj...
Mi volas pacon.



PASIGI LA TEMPON

Oni kredas ke nenion fari
estas facila
fakte tio estas malfacila
ege ege malfacila
bezonas pasigi la tempon
tio estas granda laboro
bezonas pasigi la tempon
tio estas titana laboro

Aha !
del' maten' ĝis vesper'
mi nenion faris
nenion
aha ! kia stranga afero
del' maten' ĝis vesper'
del' vesper' ĝis maten'
la saman aferon mi faris
nenion !

mi nenion faris
monrimedojn mi havis
aha! kia trista rakonto
mi estus povonta ĉion akiri
jes ja !
tion kion mi estus dezironta
mi estus ĝin akironta
sed mi nenion deziris
nenion

lun tagon tamen mi vidis
hundon
tiu hundo kiu plaĉis al mi
mi akiris ĝin
ĝi estis granda hundo
hundo de ŝafisto
sed la povra besto
ĉar ĝi enuis
enuis pri sia mastro
maljuna Skoto

mi aĉetis ĝian mastron
monrimedojn mi havis
aha ! kia stranga eĥo
oho ! kia stranga Skoto
estis la ŝafisto de mia
hundo
la tutan tagon li ploris
la tutan nokton li plorĝemis
aha !

tio estis tute sensenca
la Skoto malfortiĝis
li volis nenion kompreni
li eĉ volis sin pendi
Mi pli ŝatas miajn ŝafojn
kantis li en la skota
kaj la hundo bojis
aŭdante lin kanti
monrimedojn mi havis
mi aĉetis la ŝafojn
mi lokis ilin en mian
salonon
tiam ili pinĉis miajn tapiŝojn
kaj ili krevis pro enuo
kaj en la tombon
la Skoto ilin sekvis
aha !
kaj ankaŭ la hundo

Tiam en krozado mi foriris
Por-kvietigi-miajn-etajn-
nervoj.

Gérard Sénécal (14)

Libera traduko
de la poemo « il faut passer
le temps »
de
Jacques
PRÉVERT



TURISMA TAGO

la 15 an de Oktobro 2022

en Dives sur Mer



Dives-sur-Mer, une ville aux multiples atouts

Située en Normandie aux portes du Pays d'Auge, Dives-sur-Mer est une cité

portuaire de près de 6 000 habitants.

De la légende du Christ Saint-Sauveur en 1001 à l'origine d'un pèlerinage qui engendra son développement et la construction de son église, à l'épopée industrielle qui l'a façonnée tout au long du 20ème siècle, en passant par les préparatifs puis le départ de la flotte de Guillaume le Conquérant pour l'Angleterre en 1066, la ville de Dives-sur-Mer a hérité d'un riche patrimoine. Sept bâtiments et œuvres figurent à l'inventaire des monuments historiques, parmi lesquels la Maison Bleue de Da Costa et le Beffroi, emblème de l'usine Tréfinmétaux. Réhabilité, il accueillera bientôt le Sablier, Centre National de la Marionnette en préparation, et l'école de musique intercommunale.

Si la ville de Dives-sur-Mer reçoit de nombreux touristes avides de découvrir ses multiples atouts, elle est animée toute l'année grâce à ses services et commerces, à son marché traditionnel, à une vie culturelle et associative intense, avec une médiathèque riche et dynamique, un cinéma associatif labellisé « art et essai et jeune public », ses Festivals, sa Biennale du Livre d'Artiste...

Mais il faut aussi connaître ses blessures pour comprendre Dives et ses habitants. Dès son

implantation en 1891 par l'ingénieur Eugène Secrétan, l'usine de fabrication du cuivre a employé des générations de Divais et d'ouvriers venus de Pologne, d'Italie, d'Algérie...

qui se sont installés, ont fondé une famille. La fermeture en 1986, malgré les luttes, du poumon économique de toute une ville a créé un choc considérable. Pour de nombreux observateurs de l'époque, le glas venait de sonner pour Dives, seule ville de la Côte Fleurie dirigée par un maire communiste.

Mais Dives n'a pas sombré. Le Festival de la marionnette, aujourd'hui RéciDives, est né dès l'été de cette année là en réaction, signant la volonté de la ville de rebondir. Une zone d'activités, de nouvelles entreprises et industries ont compensé la perte d'un millier d'emplois. Port Guillaume a été créé sur l'ancien site de l'usine attirant une nouvelle population.

Aujourd'hui Dives-sur-Mer s'affirme comme l'un des principaux pôles économique et touristique de la Côte Fleurie. Elle poursuit son développement tout en améliorant son cadre de vie et en valorisant son histoire.

Danièle Garnier
Maire-adjointe Culture et Patrimoine



Dives-sur-Mer estas unika urbo sur marbordo Côte Fleurie kun sia rimarkinda heredaĵo. La urbocentro estas riĉa je listigitaj monumentoj: mezepokaj haloj, grava vendejo ekde la 15-a jarcento; grandbieno Bois-Hibout, eleganta sinjora domo el la 17-a jarcento; preĝejo Notre-Dame, konstruita kiel pilgrimloko en la 11-a jarcento.

Dives-sur-Mer ankaŭ estas la elŝipiĝejo de la floto de Vilhelmo la Konkeranto por konkeri Anglion en 1066. Spuroj de tiu historia epizodo troviĝas en diversaj lokoj de la urbo.

Listo de 475 nomoj de la kunuloj de Vilhelmo estas gravurita sur ŝtono super la enireja porĉo de la preĝejo. En la artvilaĝo "Guillaume le Conquérant", iama ĉevalŝanĝejo transformita en gastejon fine de la 19-a jarcento, troviĝas kopio de parto de la Tapiŝo de Bayeux (en ĉambro de turismoficejo).

Alia allogaĵo de la urbo estas ĝia jaĥt-haveno, "Port Guillaume". La naŭtika centro ofertas la eblecon ekzerci veladon, por komencantoj kaj ankaŭ por spertaj maristoj. Aliflanke, pluraj formuloj por marvojaĝoj estas ofertitaj fare de la havenestra oficejo kaj diversaj servoprovizantoj. La strando de Cabourg estas rekte alirebla pere de piedira ponteto.

teksto tradukita de Dominik Cornice

La fabriko de Dives, ties loĝdomoj (teksto de Pierre Cofrier, tradukas Dominik Cornice)

La starigo de la fabriko profunde ŝanĝis la urbeton de 1440 loĝantoj en 1891 kiu iĝis urbo de 5570 loĝantoj en 1931, 6264 en 1962.

La fabriko havis 250 dungitojn en 1896, 450 en 1897, 1800 en 1929, 2000 en 1960.

La alfluo de laborforto, unue el la ĉirkaŭaĵo, poste el aliaj regionoj kaj el eksterlando, necesigis iom-post-ioman konstruadon de laboristaj loĝdomoj. Apartigitaj per kanalo, du mondoj observiĝis, tiu de la fabriko ĉe la bordoj de la Dives, kun ĝiaj loĝdomoj trairitaj de la fervojo, tiu de la malnova historia urbo.

Tiu ĉi transformiĝo, fojfoje akompanata de laboristaj luktoj (strikoj de 1906, 1936, 1968) havis sekvojn sur la politika nivelo, akcentante la singularecon de Dives en ĝia kampara kaj ĉemara medio.

La fermo de la fabriko en 1986 estis sekvita de la detruo de la produktadlaborejoj. Restas rimarkinda heredaĵo ligita al la loĝejoj, la domegoj de dungantoj, la vilaoj de inĝenieroj, la domoj de laboristoj en sia arkitektura diverseco.




Monument à Laika

La Maison Bleue ("Blua Domo") estas konstruaĵo de stilo Art Brut (kruda arto). Ĝi estas verko de analfabeta masonisto de portugala deveno, Euclides Ferreira da Costa (1902-1984).

Li aĉetis la terenon de 300 m² en 1950, laŭlonge de la fervoja linio kaj ne malproksime de la fabriko Tréfinmétaux. La triĉambra loĝejo estas tre modesta, sen fluakvo. Euclides da Costa ricevis pension de handicapito ekde 1954 pro tuberkulozo. Li komencis sian verkon tri jarojn poste kaj realigis ĝin de 1957 ĝis 1977.

La domo, kies ĝardeno estas tute plenigita de malgrandaj monumentoj kaj mozaikoj faritaj el recikligitaj materialoj, estis transdonita al la municipo en 1989 kaj tiam tre rapide listigita kiel historia monumento en 1991.

Laŭ la kvalito de la verko ĝi estas « escepta atesto de Art Brut en Normandio », sed fragila kaj postulanta laboron de konservado.



1 Centre de Loisirs les Tilleuls 9046 rte de Lisieux (D45)

2 RDV Médiathèque Face au Beffroi Avenue du Commandant Charcot. Parking

3 La Maison Bleue 13 rue des Frères Bisson parking de la Médiathèque



TURISMA TAGO

la 15 an de Oktobro 2022

L'occasion pour celles et ceux qui n'ont pas pu le faire de régler leur cotisation annuelle (10€)

RDV 9h30

pour un accueil café au centre de loisirs Les Tilleuls

10h

Conférence de Pierre Coftier-en français-
" Dives l'ouvrière"

Pierre nous amènera ensuite pour une boucle de 3 kms à partir de la Médiathèque sur les pas des témoins du passé industriel.

12h30-12h45

Retour au château pour un **Repas partagé** (chacun amène un plat sucré ou salé pour 4 personnes, une boisson et **ses couverts** complets)

Après rangement et ménage

RDV à 14h 50 parking de la Médiathèque pour aller visiter la Maison bleue.

Entrée **7€** à régler avant à Sylvie. Merci de penser à l'appoint.

Après la visite, nous nous quittons.

Conseils de visites libres :

le port, la passerelle pour Cabourg et sa plage, les halles, le village Guillaume le Conquérant l'église....ou un pot en terrasse.

Conditions sanitaires en vigueur le 15 octobre

Bulletin d'Inscription à retourner avant le 1er octobre.

par mail : michele.langeois@wanadoo.fr ou par téléphone 06 74 48 96 61 (M.L)



NOM.....Prénom.....

Nombre de personnes ☐

n° de téléphone.....courriel.....@.....

Participera à la journée du 15 octobre ☐

à la conférence ☐

à la balade ☐

au repas partagé ☐

à la visite de la Maison Bleue * ☐

* je note que je réglerai 7 € à Sylvie sur place (prévoir de la monnaie ou un chèque)